# *Internacia Kortumo petas Venezuelon kaj Gujanon ne pligravigi disputon pri Esequibo*



**Ju?istino Johan Donoglouw, prezidanto de la Internacia Kortumo. Foto: Guyana Chronicle.**

Amsterdamo,  dec  2 (RHK) La Internacia Kortumo petis la registarojn de Venezuelo kaj Gujano ne pligravigi la disputon pri la teritorio de Esequibo. ?i petis amba? landojn sindeteni de ajna ago ?is fina decido pri la polemiko estos eldonita.

Ju?istino Johan Donoglouw, prezidanto de la Internacia Kortumo, klarigis, leginte la verdikton, ke ordonoj kun provizoraj decidoj havas devigan efikon, kaj kreas internaciajn jurajn devojn.

Fine de oktobro, Gujano prezentis la peton pri provizoraj decidoj  konsiderante, ke Venezuelo ne devus okazigi la referendumon, planitan por ?i tiu diman?o, la 3-an de decembro, ?is la Internacia Kortumo decidos pri la substantivaj aferoj por determini ?u la Arbitracia Laudo de 1899  validas.

La venezuela ?tato certigis, ke la referendumo planita por ?i tiu diman?o okazos.

Aliflanke, la Kariba Komunumo -CARICOM-, memorigas, ke la polemiko estas anta? la Kortumo pro decido de la ?enerala Sekretario de UN, António Guterres, por fina solvo la? la dispozicioj de la ?eneva Interkonsento de 1966, al kiu amba? partioj estas devigataj.

CARICOM anka? vokas respekti la regionon kiel Zonon de Paco kaj ne ?eni la trankvilon de la areo, esenca por la ekonomia prospero kaj socia bonfarto de ?iuj landoj de Karibio kaj Latin-Ameriko.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/341071-internacia-kortumo-petas-venezuelon-kaj-gujanon-ne-pligravigi-disputon-pri-esequibo

**Radio Habana Cuba**